



3^a trimestro 2010

En tiu numero vi legos..

En malnova revuo, D. Baron legis anekdoton pri Volter. J. Gaumé retkrozadante trovis recenzon pri libro (nun elĉerpita) traduko en esperanton de 3 verkoj de Volter.	p.1 p.2
"La Ŝlosilo" estas la kanto, kiun J.-L. Le Bri-zault kantis dum staĝo en Pluezec.	p.2 p.3 p.7
Ĉu eblas mistere malaperi en pariza tombejo ? P. Lalli rakontas.	p.4
F. Cipriani sciigas al ni, ke Sankta Marteno estas fama en Abruco.	p.4 p.5
G. Handzlik forte impresis la spektantojn, kiam li prezentis teatraĵon en Gresiljono, B. Turbillon raportas.	p.5
B. Turbillon proponas ludon.	p.5
Dank'al J.-M. Simonet, la komputiluzantoj legos 5 pliajn valorajn kialojn por uzi liberajn programojn.	p.6 p.7
Ĉu oni povas fari kukon el terpomoj ? J. kaj G. Layseman donas la recepton.	p.8
Kiu el vi jam biciklis en Pekinaj avenuoj ? A. Aude faris tion en 1986 !	p.8

La ŝuoj de Voltaire (Volter)

Voltaire havis serviston fidelan, sed iom mallaborem.

- « Jozefo, diris unu tagon la mastro, alportu miajn ŝuojn ».

La servisto rapidas alporti la ŝuojn ; sed Voltaire kun miro rimarkas, ke la ŝuoj ne estas purigitaj kaj li diras al Jozefo :

- « Vi forgesis brosi miajn ŝuojn, hodiaŭ ».
- « Ne, sinjoro, respondas la servisto ; sed la stratoj estas kotplenaj : post du horoj, viaj ŝuoj estus tiel malpuraj, kiel nun. »

Voltaire ridetas, vestas la ŝuojn kaj foriras.
Sed Jozefo kuras al li :

- « Sinjoro, li krias, la ŝlosilon ! »
- « Kian ŝlosilon ? »
- « Jes, la ŝlosilon de la manĝujo por la tagmanĝo. »
- « Nu, kia bezono ? Post du horoj vi estus tiel malsata, kiel nun ! »

De tiam, Jozefo ĉiutage brosis la ŝuojn de sia mastro.

El la revuo « Lingvo Internacia » de Februaro 1906

Pri Volter



Voltaire pseŭdonimo de François Marie Arouet (naskiĝis la 21-an de novembro 1694, mortis la 30-an de majo 1778) estis franca verkisto kaj filozofo.

E. Lanti tradukis en esperanton 3 verkojn de Volter ; la 312 paĝa libro eldonita en 1956 de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) titolas : « *Tri verkoj de Volter (Voltaire): Kandid -- Zadig -- Senartifikulo* ».

Jen recenzo de Ferenc SZILÁGYI, kiu aperis en la gazeto Norda Prismo n° 56/6, p.282

« Voltaire estis geniulo de la senbridebla memstaremo, malamiko

de ĉiuj dogmoj, impulsa kaj ne-marĉandema kritikulo de ĉiu kaj ĉio, kiun aŭ kion li konsideris kiel obstaklon de la prudento kaj humanismo. Precipe en sia lasta vivperiodo li batalis grandioze por siaj humanismaj idealoj kaj protestis akre kontraŭ ĉiu netoleremo kaj subpremo. Voltaire ne kontentiĝis per rozkolora kredemo kaj en la nomo de la batalema pesimismo li volis kontraŭbatali la komfortan optimismon de la tiutempa filozofio, kiun li vidis enkorpigita en la filozofio de Leibniz. **Kandid**, tiu ĉi -- per sango verkita -- grandioza satiro estas freŝe vivanta verko, ĉar la progresema ne perdis sian aktualecon kaj la libron eĉ la malamiko de la troa kontraŭdogmatismo de Voltaire povas kun utilo legi ankaŭ nun, ĉar oni retrovas en ĝi la karakterizaĵojn de la modernaj kredigoj kaj mensogoj. Voltaire estas pli aktuala nun ol iam.

Zadig ne atingas la nivelon de **Kandid**, sed en ĝiaj detaloj kaŝas sin multe da trezoroj el la sprito Voltera. La av22enturoj de **Zadig** finiĝas feliĉe (ankaŭ **Kandid** finiĝas trankvile, sed rezigne): **Zadig**, la honestulo ricevas benon de la hazardo, kiu povas esti favora, dum la homo mem ne kapablas regi la fluon de sia vivo. Ne trogravigu do vin mem kaj precipe ne je la konto de viaj samsortanoj -- jen moralo de Voltaire.

73-jara estis Voltaire, kiam lia tria verko de tiu ĉi libro, "**Senartifikulo**" aperis proksimume jardekon post **Kandido**. "**Senartifikulo**" venas en la socion kun naiva verdiremo kaj senfalsa sincero, kaj tion la farizeismo kaj antaŭjuĝoj ne povas toleri. Liaj bonintencaj kaj sukcesaj aventuroj finiĝas ĉiam kun groteskaj kontrastoj. **Senartifikulo** fine iĝas rezignema kaj akceptas la mondon en sia malperfekto. Sed kvankam la aventuroj finiĝas per rezigno, ili mem donas multe da instruo kontraŭ la antaŭjuĝoj, kies plej humanisma kontraŭbatalanto estis Voltaire. Lia rezignemo ne signifas kompletan pesimismon, male: ĉar Voltaire, la maljunulo, laŭ la leĝo de la naturo ne povis daŭrigi la batalon, jen daŭrigu la posteuloj. Tiu ĉi

eterna aktualeco donas vervon kaj forton al la verkoj de Voltaire. Dum aliaj klasikuloj ne povas brili konstante, Voltaire restas konstanta astro.

Lanti havis similajn karaktertraĵojn, malamiko de ĉiu antaŭjuĝo, senenhava aŭ troa tradiciemo, li estis pesimisto, sed lia pesimismo neniam rigidigis aŭ haltigis lin. Ankaŭ li estas pendolanta inter pesimismo kaj optimismo. Pri tio troviĝas interesa konfeso inter la notoj de Lanti (p. 222): "Fakte la mondo estas fuŝa, kaosa, kaj ĝi povas iom pliboniĝi, nur se malvolviĝos la racio en la homa cerbo kaj la kompato en la homa koro. Mi ne scias, ĉu tio estas esprebla, sed ne dubas pri ties dezirinda, kaj tio estas mia opinio sufiĉa, por instigi nin labori tiucele." El la renkonto de tiuj multrilate parencanimoj povis naskiĝi nur brila traduko, ĉar Lanti metis en la tradukon tute sin mem, sian trafan lingvokapablon kaj sian efikan kaj pure klasikan stilon. La reeldono de **Kandid** do, kun la kompletigaj du verkoj, estas salutinda gratulinda entrepreno. »



Jean-Louis Le Brizault proponas kanton :

La Ŝlosilo.

Anĝela Duval skribis la poemon en la bretona lingvo, Hélène Caous elbretonigis kaj adaptis ĝin, Véronique Autret komponis la muzikon.

Kiu estis Anĝela Duval ?

Ŝi naskiĝis la 3-an de aprilo 1905 en Vieux Marché, proksime de Plouaret (Trégor) en departemento "Côtes d'Armor", en Bretonio, kaj forpasis la 7-an de novembro 1981 en Lannion (Trégor).

Ŝi estis poetino en Bretona lingvo, kaj bretonlingva fabelistino.

"La lingvo, la esenco de la kultura identeco, estas vera trezoro, kies oran ŝlosilon ni neniam devas perdi."

Vidu muziknotojn paĝo 7



An alc'houez aour

Me an'vez ur c'hastell
Savet 'kreiz ar c'hoadoù
'Zo kuzhet 'n e dourell
Ar c'haeran tenzoriou

Prennet e chom an nor
An alc'houez aour kollet
Taolet eo bet er mor
Gant tud diskantet

Gant un alc'houez es-
tren
Zo klasket he digor
Bepred eo chomet
prenn
Ret kaout an alc'houez
aour

Tenzor, ijin ar ouenn
Barzhar ha lennegezh
'Chomo kuzh da viken
P'eo kollet an alc'houez

Kelted dispont ha taer
O deus spluget er mor
Kavet an alc'houet kaer
Digor dor an tenzor

Hag holl denzoriou
Breizh
Zo dispak er c'hastel
Gant alc'houez aour ar
yezh
Digor dor an dourell

La clef d'or

Je connais un château
élevé au milieu des bois.
Sont cachés dans sa tour
Les plus beaux trésors

La porte de la tour reste
fermée

La clef d'or a été perdue
Elle a été jetée dans la
mer
Par des gens sans esprit

Avec une clef étrangère
On a essayé de l'ouvrir
Cependant elle est restée
fermée
Il faut absolument avoir
la clef d'or

Les trésors de notre peu-
ple,
Les contes et la littératu-
re
Restent cachés à jamais,
Car la clef a été perdue

Des celtes sans peur et
courageux
Ont plongé dans la mer
La belle clef a été retrou-
vée
Et on a pu ouvrir la porte
du trésor

Et tous les trésors de
Bretagne
Sont éparpillés dans le
château
Avec la clef d'or de la lan-
gue
On a pu ouvrir la porte de
la tour.

La ŝlosilo

Se volas vi vojaĝi
Tra la vastega mondo
En liber' kun fremduloj,
La lingvo estas lim'

Ne timu montru vin do
Trovu metodon simplan
Per ĝi ja tuj vi puŝu
Ĉiujn perantojn for

Serĉu ŝlosilon, serĉu ŝlosilon
Serĉu ŝlosilon amikojn
Lernu la lingvon ĉar per esperanto
La pordon malfermis nun ni

Se estas vi maljuna
Sen lertec' kaj sen mono
Ne ploru pri la vivo,
Kiu malmolas plu

Se vi amikoj volas
Tra tuta la planedo
Per esperanto skribu
Vivos libero nun

Serĉu ŝlosilon, serĉu ŝlosilon
Serĉu ŝlosilon amikojn
Lernu la lingvon ĉar per esperanto
La pordon malfermis nun ni

Lingvo de ĉiu lando
Estas trezoro vera
Ĉiu popol' sur tero
Sin ŝirmas por la viv'

Se volas vi paroli
Interkompreni vin do
Tro forte ne cerbumu
Jen esperanto ja

Al mi respektu
Ilin respektu
Al ĉiuj lingvoj respektu
Per esperanto nenies regado
Egalas nun ĉiuj en mond'

Mistero en Montparnasse

Ni estas en hotelo apud la stacidomo de Montparnasse. Fruposttagmeze ni trafos trajnon por reiri ĉe niajn geamikojn en Tours: Jacques kaj Marie France. Tamen la tuta mateno estas libera, disponebla: ĉu supreniri al la supro de la ĉielskrapanto, kiu siluetiĝas antaŭ ni, por ĝui mirindan panoramon, aŭ viziti la piedalireblan tombejon? Franca (Franka) opcias por vizito de la tombo de Guy de Maupassant, kies arton ŝi persiste admiras. Ni ekmarŝas kaj iom poste atingas la enirejon de la tombejo, kie granda anĝelo gardas la dor-



mon de forpasintoj. Ni tuj ekrimarkas la tombon de Sartre. Ni trarigardas la tabulon kun la listo de nomoj kaj relativa pozicio en la tombejo; do ni elektas la ĝustan direkton. Alvenintaj kien ni supozas la tombon de Guy, mi unuflanken kaj Franca apude, laŭ paralela koridoro, enpenetras labirinton de nedifinitaj tomboj. Post kvin minutoj mi levas mian kapon por rigardi ĉirkaŭen. Franca malaperis. Ĉe la horizonto nenio. Mi penas laŭtvoki, sed la voĉo perfidas min. La klimatizita aero en la aŭto senigis min je ĝia uzado. Maltrankvile mi orte iras ĉiujn padojn de tiu zono. Kio okazis? Mian menson malklarigas du eblaj hazardoj: eble ŝi ekmalbonfartis kaj do kuŝas surtere, aŭ pli malbone iĝis viktimo de krimulo. En la centra aleo mi finfine ekvidas, ĉe ĉirkaŭira dispartigo, neblankulan gardiston.

- J'ai perdu ma femme* -, estis mia peto pri helpo.

Mi ne povas min deteni rimarki sur la vizaĝo de la viro miran rideton. Oni ne kaplabas perdiĝi en tombejo! Li demandas: - Ĉu vi kunportis poŝtelefonon? - Ne. Ni kutimas ĉiam promeni flanke sen disiĝi. Al kio ĝi utilis eksterlande? - Mi ekkonscias, ke mi havas nenian dokumenton, ĉar Franca estas la ĉiondeponpreanto. Turmenta konsterno atakas min.

- Kiel ŝi vestis sin? - demandas la gardisto. Mi respondas: - Malhela pantalone kaj nigra bluzo -. Vere mi ne estis certa pri la precizeco de la sciigoj. Bedaŭrinde aŭ bonŝance virinoj estas facile ŝanĝiĝemaj, aparte je la ekstera aspekto. La gardisto avertas telefone la kolegojn, por serĉi malhelan virinon kun blanka vizaĝo, en teritorio frekventata nur de kolorhaŭtaj gardistoj. Post longtempe, kio ŝajnis al mi eterneco, proksimigas min gardistino, kiu avertas min: - Via kunulino estas atendanta ĉe la enirejo -.

Mi atingas kaj sieĝas ŝin per demandoj: - Kie vi estis? Kiel mi perdis vin el la vido?

Ŝi plej kviete klarigas, ke ŝi estis gvidita en alian sektoron disigitan per muro, kiu ne permesis vidadon. Ŝi estas tre kontenta: ŝia fotoaparato entenas foton de la tombo de Guy, ŝia preferata aŭtoro.

Dum mi brakumas ŝin, rekuraĝigita, mia rigardo falas sur ŝian ĉemizon. Ĝi ne estas nigra, sed ... leoparda!

* *Mi perdis mian edzinon*

Pino Lalli



Abruca solenado de Sankta Martino

Apud Sulmono, urbo kie mi loĝas, situas Scanno, ĉelaga urbeto je 1000 metroj super la maro. Ĝi estas fama pro teritoria aranĝo mezepoka bone konservita, sed precipe pro la kostumo, kiun ankoraŭ kelka virino surmetas kune kun tipa kapkovrilo.

Ĉi tiu sugesta urbeto, iĝinta emblemo de la

abruca folkloro, transigas ĉiujare interesan manifestacion kun la popola partopreno. Ĝi okazas la 10an de Novembro per solenado de la "gloroj" de S. Martino, episkopo de Tours, en mia regiono proklamita Sanktulo pri Abundo kaj ankaŭ protektanto de nefeliĉaj edzoj.

Ĉirkaŭ grandaj kampaj fajroj (gloroj), pre-tigitaj kaj bruligitaj de junuloj, oni kantas, dancas, gustumas tipajn dolĉaĵojn, trinkas vinon dum la tuta nokto. Originala konkurso konsistas daŭrigi la bruladon de la propra "gloro" antaŭ la groto, kie, laŭ la legendo, loĝis la fama sanktulo.

Franca Cipriani

S. Martino sur dekkvinjarcenta ligngravuraĵo



● ● ● ● ● ● ● ● ● ●
GEORGO HANDZLIK,

la bardo sen barbo

Jam de pluraj jaroj, tiu nomo fame konatiĝas en Esperantujo. Unue pro siaj kantoj sufiĉe humuraj kaj spicaj por allogi aŭdantaron. Kun diskreta gitara akompano por plene ĝui la parolojn, estas vera plezuro. La esperantistoj de Grésillon ofte restis malfrue en la nokto pro improvizita koncerto.

Sed lia famo plivastiĝis post la prezento, en Universalaj Kongresoj, de la unuakta teatraĵo pri Zamenhof. Grésillon havis la ŝancon okazigi ĝin tri foje dum la somero.

Eĉ se oni konas la vivon de Zamenhof, oni

eltiras detaletojn. Mi min demandis, kio aŭ kiu estis la fonto de la teksto.

La temo estas alloga por esperantistoj kaj plue la aktorado estas elstara. Mi ne volis skribi "profesia", ĉar mi ne scias, sed certe profesnivela. Diris membro de nia grupo : "li ne rolis, li ne aktoris Zamenhof, li ESTIS Zamenhof", kaj vere tiel estis. Mi memoras kelkajn scenojn tre emociajn, kiam li parolas al la foto de la edzino, kiam li rakontas la unuajn provojn kiel kuracisto, mi sentis emon konsoli lin ! Estas tiel facile, tiel lerta li estis, eniri en la teatraĵon, en la vivon mem de Zamenhof.

Jam sufiĉe granda nombro de niaj membroj spektis kaj ĝuis la teatraĵon, kaj, se vi havas okazon, vidu aŭ revidu ĝin, vi certe ne bedaŭros.

Bérenĝère



Lokigu korekte la literojn por trovi vorton

1	2	3	1	2	3	1	2	3
1 = I ; E ; N			2 = S ; T ; R			3 = P ; O ; A		
1	2	3	1	2	3	1	2	3
1 = I ; P ; T			2 = A ; I ; P			3 = O ; C ; R		

10 valoraj kialoj por uzi liberajn programarojn.

(Sekvo de la artikolo de T.L. 18)

6. Por la reagkapableco de la komunumo de la libera programaro.

Ĉirkaŭ la ideo pri la libera aĵo kaj la liberaj programaroj estiĝis granda komunumo de programistoj, uzantoj, tradukistoj, grafistoj. Tiuj homoj laboras por entreprenoj, publikaj aŭ teritoriaj administracioj, publikaj aŭ privataj esploradlaboratorioj, universitatoj, aŭ estas nur pasiaj programistoj, entuziasmaj pri komputiko.

Tiuj-ĉi laboras en dekmiloj da projektoj, kies amplekso kaj organizmaniero estas ege diversaj. Tamen, plej ofte, la laboro grandkvante malkoncentriĝas kaj interreto estas la organizcentro de la projektoj. En tiu komunuma modelo por disvolviĝo, la rilato inter la uzanto kaj la programisto ne plu estas rilato de kliento al provizanto, sed de homo al homo, unue elektante interhelpon. La uzanto fariĝas aganto de la krea procezo, kaj partoprenas la plibonigon de la programaro.

7. Por havi la lastajn versiojn.

Komputiko (aparataro kaj programaro) estas fako, kiu tre rapide progresas. Per la liberaj programaroj vi povas :

- sekvi la evoluojn pri produkto preskaŭ tagon post tago, ĉar ne komerca aŭ merkata logiko regas la vivon de iu libera programaro, sed logiko al rezulto ;
- elŝuti senpage la lastan version.

Ĉar la fontokodo estas malfermita, estas pli facile por komunumo de fakuloj malkovri kaj korekti la mankojn en sistemo ol kiam ili estas antaŭ tute fermitaj en «nigra skatolo».

La liberaj programaroj estas ofte sendependaj de la komercaj devigoj : la programara ellaborado ne estas regita de la rentabilitato kaj konsekvence la korektoj pri malgravaj problemoj ne estas neglektitaj.

8. Por eliri el la kontraŭleĝeco.

Ĉu vi pagis la licencojn de viaj preferataj aplikaĵoj ? Per uzo de la liberaj programaroj :

- ne kosto pri licencoj ;
- do neniu risko esti en la kontraŭleĝeco ;
- do neniu risko esti persekutota.

Memorigcele vi riskas maksimume trijaran malliberigon kaj 1,5 milionojn eŭrojn koston monpunon.

9. Por la protekto de via privata vivo.

Spionaj kaj malbonintencaj programaroj , nedezirataj retpoŝtoj, retkaptiloj ...

Ĉu vi estas certa, ke vi protektas vian privatan vivon, precipe kiam vi ricevas retpoŝtojn aŭ retkrozadas ?

Iuj iloj por retkrozado, retpoŝtleĝado ebligas, ke pirataj programaroj funkcias sen via scio en via komputilo.

Ĉu viaj kutimoj pri retkrozado, viaj personaj informoj, viaj kodoj vere restas en via komputilo ?

La sekurecon tute integras la liberaj programaroj kiel Firefox (retkrozado) kaj Thunderbird (retpoŝto), elpensitaj por eviti kiel eble plej ofte tiajn malagrablaĵojn. La travidebleco de la kodo ankaŭ ebligas certiĝi, ke la fabrikanto ne enkondukas - propravole aŭ laŭ peto - servojn, sekretajn pordojn aŭ spionajn programojn cele al kontrolado aŭ kaptado de la datenoj.

10. Por la senkosteco

La liberaj programaroj estas senkostaj : ne plu estas licenco aĉetota, revalidigota ...

Por la komputikaj respondeculoj, la tiel realigitaj ŝparaĵoj povas ekzemple ebligi la financadon de lokaj entreprenoj de servoj prefere al programareldonistoj situantaj plej ofte eksterlande.

Jean-Mary Simonet

<http://www.framasoft.net/><http://www.education.free.fr/><http://lelogiciellibre.net/><http://www.ubuntu-fr.org/><http://www.winlibre.com/><http://abuledu.org/><http://www.leslogicielslibres.com/><http://aful.org/>liberaj libroj : <http://www.framabook.org/>libera muziko : <http://www.jamendo.com/fr/>Paroloj : Angela DUVAL
Muziko : F.D.

La Ŝlosilo

Elbretonigis, kaj adaptis :
Hélène CAOUS POUHAER

Se vo-las vi vo-ja-gi tra la vas- (te) - ga
Se es-tas vi mal-ju-na sen lex-tec' kaj - ga
Ling-vo de ĉi- u lan-do es-tas tre- 30- sen
no
mon-do
mo- no
ve- ro
En li- ber' kun frem- du- loj.
ne plo-ru pri la vi- vo
ĉi- u po- pol' sur te- ro
la ling-vo es- tas lim'. Ne ti- mu mon- tru
ki- u mal- mo- las plu. Se vi a- mi- kojn
sin ĉir- mas por la viv'. Se vo- las vi- kojn
pa-
vin do
vo- las
ro- li
tro- vu me- to- don sim- plan
tra ter- ta la pla- ne- do
in- ter- kom- pre- ni vin do
Per ĝi ja tuj vi pu- su di- ujn pe- ran- tojn
Per es- pe- ran- to skri- bu vi- vos li- be- ro
tro for- te ne cer- bu- mu jen es- pe- ran- to
for- nun. ja. 12 Pre- nu ŝlo- si- lon, Pre- nu ŝlo- si- lon
3- al mi, res- pek- tu i- lin res- pek- tu
Pre- nu ŝlo- si- lon a- mi- koj Ler- nu la ling- von ĉar
al ĉi- u ling- voj res- pek- tu Per es- pe- ran- to ne
per es- pe- ran- to la por- don mal- fer- mis nun ni
ni- es re- ga- do, e- ga- las nun ĉi- u en mond'.

Terpoma kuko (por 4 personoj)

- ✓ 800 g da terpomoj ;
- ✓ 100 g da kuirita ŝinko en unu tranĉaĵo ;
- ✓ 200 g da verdaj pizoj elgutigitaj el la skatolo ;
- ✓ 100 g da raspita fromaĝo (ekzemple : grujero) ;
- ✓ 3 ovoj ;
- ✓ 3 supkuleroj da freŝa kremo ;
- ✓ 5 supkuleroj da hakita petroselo ;
- ✓ 20 g da butero ;
- ✓ salo - pipro.
- Senŝeligu la terpomojn, kvaronigu ilin, metu ilin en travideblan ujon kun 3 supkuleroj da akvo kaj unu pinĉopreno da salo.
- Kovru kaj enfornu dum 10 minutoj.
- Kaĉigu la terpomojn, aldonu la kremon, la batitajn ovojn, la raspitan fromaĝon, salon, pipron, la hakitan petroselon. Tranĉu la ŝinkon en rimenojn.
- Grasumu muldilon kaj plenigu ĝin per sinsekvaj tavoloj de kaĉo, verdaj pizoj, ŝinkorimenoj. Finu per kaĉtavolo.
- Aldonu kelkajn pecojn da butero, kovru kaj metu en bakfornon dum 6 minutoj.
- Eltiru la kukon el la muldilo.
- Servu ĝin tranĉita kun salato (ekzemple : laktuko - kreso aŭ salato de krudaj spinacoj).

Jeannine kaj Gérard Layseman



Kongresa memoraĵo

En la jaro 1986-a okazis la Universala Kongreso en Pekino al kiu mi frue aliĝis ; mia edzino, pro vojaĝo en Ĉinio farita du jarojn antaŭe, ne volis reiri.

Do tre frue mi aliĝis, elektis vojaĝi per la pakistana aviadilkompanio ĉar ĝi estis la plej

malmultekosta. Mi la tuton pagis, ricevis de UEA la atestilojn. Mi devis flugi de Parizo al Pekino je preciza horaro. Sed, du semajnojn antaŭ la foriro mi ricevis informon laŭ kiu, ĉar ne estas loko en la aviadilo, mi devas foriri el Frankfurto ĝis Pekino. Kune estis la horaro de la flugo kaj bileto, neniuj kompenso estis aldonita pro la vojaĝo de Tours al Frankfurto.

Fakte, tiu malagrabla surprizo kontentigis min, ĉar mi alvenis en Pekino du tagojn antaŭ la kongresa inaŭguro, do dum du tagoj mi estis libera. Alvenante ĉe la imperiestran palacon mi ekvidis junan eŭropanon sur biciklo : estis germano. Dank'al la kelkaj germanaj vortoj konataj de mi, mi sciis, ke li prunteprenis la biciklon de riparisto sur la granda avenuo. Do mi iris (en tiu tempo mi bone marŝis) tamen mi marŝis dum pli ol unu horo en Pekina avenuo apud kiu Grammont en Tours estas vojeto. Do trovinte la taŭgan lokon mi lasis mian pasporton kaj foriris bicikle. Dum du tagoj mi trabiciklis la tutan Pekinon tute libere, sen kontrolo. Tiun plezuron ne havis la kongresanoj alvenantaj ĝustatempe. Ĉio okazis bonorde, eĉ kiam post vizito de la imperiestra palaco mi devis movigi plurajn dekojn da bicikloj parkitaj sur la mia. Por mi tiu biciklado meze de la ĉina amaso estis vera donaco, mi sentis min feliĉa kiel reĝo, fieraj esti tiam verŝajne la sola loĝanto de St Avertin biciklanta sur la pekinaj stratoj.

André Aude

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr